

TRIA PASKA DIMANĈO – 19an de aprilo 2015

**KRISTO DEVIS MORTI KAJ LEVIĜI EL LA MORTINTOJ LA TRIAN TAGON.
– Komento de p. Alberto Maggi OSM**

El la evangelio laŭ Luko 24, 35-48

En tiu tempo la disĉiploj el Emaus rakontis tion, kio okazis al ili sur la vojo, kaj kiel ili rekonis Jesuon dum la dispecigo de la pano. La disĉiploj estis interparolantaj pri tio, kiam Jesuo mem aperis meze de ili, kaj diris: "Paco estu al vi!". Kun konsterno kaj timo ili unue pensis, ke ili vidas fantomon. Sed Jesuo diris al ili: "Kial vi havas tiom da duboj en via koro? Rigardu miajn manojn kaj miajn piedojn! Vere estas Mi! Tuŝu Min kaj certigu: fantomo ne havas karnon kaj ostojn, kiel Mi". Kaj tion dirante Jesuo montris al ili siajn manojn kaj piedojn. Ili tamen ne povis ankoraŭ kredi pro miro kaj ĝojo. Tiam Jesuo demandis ilin: "Ĉu vi havas ion por manĝi?". Ili donis al Li iom da rostita fiŝo. Jesuo prenis kaj manĝis ĝin antaŭ ili.

Poste Li diris al ili: "Jen estas miaj vortoj, kiujn mi parolis al vi, kiam Mi ankoraŭ estis ĉe vi. Mi ripetis, ke devas plenumiĝi ĉio, kio estas skribita pri Mi en la leĝo de Moseo, en la libro de la profetoj kaj en la psalmoj". Jesuo helpis ilin kompreni la signifon de la Skriboj, kaj Li diris al ili: "Estas skribite, ke la Mesio devos morti, sed la trian tagon Li devos leviĝi el la mortintoj. Laŭ lia ordono nun devas esti predikata al ĉiuj popoloj invito al konvertiĝo por ricevi pardonon de pekoj. Vi estos atestantoj pri tio, komencante de Jerusalemo".

Dum neniuj el la evangeliistoj priskribas al ni la momenton de la releviĝo de Jesuo, ĉiuj diversmaniere donas indikojn pri kiel la ĉiutempaj komunumoj povas sperti la releviĝon. La peco kiun ni hodiaŭ ekzamenas estas je ĉapitro 24 de Luko, ekde versiklo 35.

Temas pri la konkludo de la epizodo konata kiel tiu pri la disĉiploj de Emaus. En tiu ĉi peco ni povas distingi kvin momentojn gravajn, kiuj estas valoraj indikoj por la komunumoj de la kredantoj de ĉiuj tempoj.

La unua estas ke Jesuo estas rekonata en la momento de la pandispecigo. Ĝi estas aludo al Eŭkaristio en kiu Jesuo, la filo de Dio, iĝas pano, vivnutraĵo, por ke tiuj kiuj lin akceptas kaj poste kapablas siavice iĝi pano, tio estas vivnutraĵo, rompante sian vivon por la aliaj, iĝu filoj de la sama Dio. En tiu dinamiko de amo ricevita kaj de amo transdonata oni spertas la releviĝintan Kriston. Jen do la unua indiko: Kristo rekoneblas per la pandispecigo.

La dua estas, ke kiam Jesuo manifestiĝas, kaj tio estas karakterizo de ĉiuj evangeliistoj, li sin metas ĉiam en la mezon. Jesuo sin metas nek supren, nek antaŭen, kio estus kreinta hierarkion inter tiuj kiuj estas al li pli proksimaj. Jesuo sin metas mezen kaj ĉiuj disĉiploj estas ĉirkaŭe. Estas rilategaleco kun li. Jesuo en la mezo ne altiras al si, ne ensorbas la energiojn de la siaj, sed li komunikas al ili siajn energiojn kaj instigas ilin plenumi tion kio estas mandato.

Kaj kiam Jesuo manifestiĝas, li ne bondeziras pacon, li ne diras "la paco estu kun vi", sed li donacas la pacon, kiu reprezentas tion kio kontribuas al la pleneco de la homa feliĉo. En la prikomentata peco la disĉiploj estas konsternitaj ĉar por ili Jesuo mortis kaj ili ne kapablas motivi la fakton ke ili lin revidas vivanta, Jesuo do volas komprenigi al ili ke li ne estas spirito, sed persono kiu havas la dian kondiĉon.

La dia kondiĉo ne nuligas la fizikecon de la persono, sed ĝin ampleksigas kaj aliigas. En tiu senco pli poste Sankta Paŭlo en la unua letero al la Korintanoj diras: "Oni transiras de animala al spirita korpo". Kaj jen kial la bildo, kiun la evangeliisto prezentas al ni pri Jesuo, kiu prenas la rostitan fiŝon kaj ĝin manĝas.

Por kompreni tion kio estas okazanta la evangeliisto skribas tiun ĉi strangan esprimon: *Poste Li diris al ili: "Jen estas miaj vortoj, kiujn mi parolis al vi, kiam Mi ankoraŭ estis ĉe vi"*. Kion signifas "kiam Mi ankoraŭ estis ĉe vi"? Li ĉeestas en tiu ĉi momento, sed nun li estas tie en malsama maniero, do la ebleco pri la sperto de releviĝinta Kristo estas por la kredantoj de ĉiuj tempoj komprenebla malsammaniere.

Jesuo poste malfermigas la menson al la Sankta Skribo. Kiel sukcesas Jesuo malfermigi la menson al la Sankta Skribo? Tion li jam faris kun la disĉiploj de Emaus, ĝn interpretante. La Skribo devas esti legata samspirite kiel ĝi estis skribita, nome per la amo de Dio por la homo. Por kompreni la Skribon do oni devas meti kiel absoluta valoro en sian propran ekziston la absolutan amon de Dio por la homaro. Tio komprenigas la Sanktan Skribon. Jen kial la evangeliisto diras: *Jesuo helpis ilin kompreni la signifon de la Skriboj.*

Kaj fine, kiel ni jam diris, Jesuo ne ensorbas la disĉiplojn por si, li ilin ne altiras, sed li komunikas sian forton kaj puŝas ilin for. Kaj jen la fina mandato.

Sendi ĉiujn popolojn, kaj oni celas la paganajn popolojn, *prediki la konvertiĝon*, la vivoŝanĝon. La konvertiĝo en la evangelio signifas radikalan vivoŝanĝon en propra konduto, en la skalo de la valoroj, ne plu vivi por si mem, por siaj bezonoj, sed por la bono kaj la bezonoj de la aliaj.

Tiu konduto de radikala rompo kun propra pasinteco kaj orientado de propra vivo al la bono de la aliaj akirigas *la pardonon de la pekoj*. Diras Jesuo: *la konvertiĝo por ricevi pardonon de pekoj*. Tio estas forigo de la pekoj, ne kiel kelkfoje estas tradukite "la konvertiĝo kaj la pardono de la pekoj".

Jesuo iom polemike aldonas: "*komencante de Jerusalemo*". La evangeliisto utiligas la sanktan vorton Jerusalemo, kiu indikas la religian institucion. Nu, por Jesuo la religia institucio, Jerusalemo, similas la paganajn popolojn. Ankaŭ ĝi bezonas konvertiĝon por ricevi la pardonon de la pekoj.